



LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Grafdijk (NH), Nederlando
Ĝironumero 382363 Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

ĈU ESPERANTISTA MONDFESTIVALO?

Kiam ni komparas la hodiaŭan Esperanto-movadon kun tiu en la tempo de la unua kongreso, okulfrapas nin du gravaj diferencoj:

Fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj oni klopodis disvastigi Esperanton en ĉiaj medioj, rezonante, ke ju pli da esperantistoj, des pli baldaŭ la lingvo estos oficiale enkondukata; nuntempe oni prave unualoke klopodas interesigi gravajn instancojn (UNESCO, registaroj) pri nia afero. Bedaŭrinde multaj esperantistoj interpretas ĉi tion, kvazaŭ nun ne plu necesas propagandi en la ĝenerala kadro.

„Tuj kiam Esperanto oni ĉi tie estos akceptita kaj enkondukita en la lernejojn“, ili diras, „ja venos multaj novaj esperantistoj kaj ĉio per si mem aranĝigos.“

Sed ĉi tiuj samideanoj forgesas, ke la enkonduko de E-to pleje dependas de ĝia disvastigiteco kaj ju pli ĝi estas aplikata kaj montras sian praktikan taŭgecon, des pli baldaŭ registaroj k.t.p. konvinkiĝos.

Flanke do de la klopodoj influu ĉi tiujn instancojn, ni devas daŭrigi nian propagandon, ne nur obstine kaj neŝanĝeble, sed ankaŭ per sistemo bone organizita. Por ĉi tiu sistemo estas bezonataj la fortoj de ĉiuj esperantistoj, al kiu ajn unuiĝo ili apartenu. Ili sin liberigu de la por sia propra movado ekzistanta ŝovinismo kaj klare vidu antaŭ si ĉi tiun neceson por Esperanto ĝenerale.

La alia diferenco estas, mi jam nōmis ĝin en la ĉi-supraj linioj, la ekzisto de multaj unuiĝoj, konformaj al la bezonoj de diversaj kategorioj el la homaro tutmonda. Ili propagandas, sed ne, aŭ nur tre malmulte, kunlaboradas unu kun la aliaj. Eĉ ne estas troigite diri, ke en diversaj landoj venis inter ili fendo preskaŭ ne transirebla!

Feliĉe en la lasta tempo aŭdiĝas diversaj voĉoj, ke tia stato en la Esperanto-movado ne plu estas tolerebla kaj ke ĝi ege malbone efikas al la granda publiko.

Ĉi-rilate estas grave pristudi la proponon de s-ro T. Jung, aperintan en „Heroldo de Esperanto” de la 16-a de marto 1952-a.

Mi citas el lia artikolo la jenon:

„La ideo estas proksimume tiu, ke, same kiel la sportuloj havas ĉiun kvaran jaron sian Olimpiadon, la skoltoj sian Mondjamboreon, la katolikoj sian Eŭkaristan kongreson, same tiel la tutmonda esperantistaro havu, post po du, tri aŭ kvar universalaj kongresoj, sian Esperantistan Mondfeston, sian Kongreson de Tutmonda Interkompreno aŭ kiun nomon oni volas doni al ĝi. Tiu Mondfestado kunigu en sia kadro la tiujaran U.K., la S.A.T.-kongreson, la kongresojn de I.K.U.E., K.E.L.I., T.J.O., U.L. k.t.p.: Kompreneble tiu Mondfestado devos esti iom alie organizita kaj devos enhavi alian programon ol la ĉiujara U.K. (s-ro Jung estas UEA-membro). Okazu unu solena Malferma Kunveno por ĉiuj, tri-kvar aliaj komunaj kunvenoj, la kutima komuna tuttaga ekskurso, balo, se eble teatraĵo kaj/aŭ koncerto; en la komunaj kunvenoj la kongresanoj havu okazon ekkoni kiel eble plej multajn el siaj agemaj laborantoj per po 5-10-minutaj alparoloj kaj paroladetoj. Nepre estu organizata almenaŭ unu granda publika aranĝo. Kaj cetere interkonatiĝo, interbabilado, interamikigi, mallonge: samideana festivalo.”

Ke tia aranĝo enhavas ĉion bonan estas fakto nekontestebla kaj estas la tasko de la diversaj estraroj ne por esplori, ĉu tia entrepreno estos efektivebla, ĉar kun **iom da bona volo** ili certe sukcesos en tio, sed por kiom eble plej multe stimuli al agado grandioza kaj manifestacia.

Ke stariĝos malfacilaĵoj rilate al loĝado, taŭgaj salonoj, diversaj aranĝoj k.t.p., estas kompreneble, sed oni per komunaj fortoj kaj antaŭa interkonsiliĝo certe trovos solvon.

Ĉu en tia kongreso estiĝos la bazo, sur kiu ĉiuj esperantistoj kunlaboros por la disvastigado de nia lingvo? Ni sincere esperu tion.

T. K.

Vi estas kiel floro.

(Responde al la traduko de Mihaelo, kiun ni havis en la antaŭa n-ro de LJV, s-ro Butler (Surrey, Britujo) respondis:

„Traduko vere bela. Tamen ĝi aliĝas la ritmon. Mi jam havas 13 aliajn tradukojn, kiuj ankaŭ ne estas kanteblaj laŭ la melodioj de Schumann, Liszt aŭ Rubenstein.” — Li aldonis la suban tradukon el sia KANTARO ESPERANTA, kiu taŭgas por ĉiuj supre nomitaj melodioj):

Vi estas bela, pura
Kaj ĉarma kiel flor' ...
Vidante vin, sopiron
Mi sentas en la kor'.

Kun man' sur via kapo
Mi preĝas al ĉiel':
Dio vin gardu konstante
En ĉarmo, puro, bel'.

M. C. Butler.

INTERNACIA JUNULARKUNVENO EN BASEL (3-4 marto '52-a).

Tridek gejunuloj el Francujo, Svislando kaj Germanujo kunvenis dum du tagoj en internacia junularkunveno en Basel, aranĝita de la Svisa Junular-Sekcio.

S-ano Bruno Graf en la malfermo povis voĉlegi salutleterojn de diversaj publikaj instancoj, kiel ekz. de la estro de la tutsvisa politika departemento.

Okazis laborkunsido kun raportoj de la landaj delegacioj. Tie montriĝis, ke la Svisa Junular-Sekcio, fondiĝinta nur antaŭ unu jaro, havas nun jam 22 aktivajn junajn membrojn. En Germanujo ekzistas 30 lokaj grupoj de la G.E.J. (Germana Esperanto-Junularo) kaj po centoj da membroj de T.J.O. kaj la S.A.T.-J.F.

La kunvenintaj delegitoj tiam pritraktis la varbadon por Esperanto inter la junularo en jenaj temoj: „Kiel mi propagandas Esperanton?“, „Kial Esperanto ne progresas pli rapide en mia lando?“ kaj „Kio estas plej farenda por atingi pli efikan sukceson?“. Espereble la svisa Junular-Sekcio multobligos la rezulton de tiuj diskutoj, por ke oni ankaŭ alie povu uzi ĝin.

Post vigla diskutado estis unuanime akceptata jena rezolucio:

„Pro la nunaj politikaj kaj ekonomiaj diferencoj inter la nacioj ni postulas la aprobon kaj praktikan aplikadon de la neŭtrala helplingvo supernacia Esperanto, kiel unuan urĝan bazon por pli bona kompreniĝo inter la popoloj. Ni petas la kompetentajn aŭtoritatojn por instruado kaj edukado plani la instruadon de Esperanto en la oficialaj lernejoj de Svislando, kiel jam plensukcese okazas en aliaj landoj.“

Tiu rezolucio estis transdonita al kvindek svisaj gazetoj.

Por vigligi la disvastigon de la ideo de la internacia amikeco pere de la internacia lingvo Esperanto, la delegitoj akceptis unuanime la sekvantan duan rezolucion:

„La delegitoj de la svisa, franca kaj germana Esperantistaj junularoj, kunvenintaj dum internacia junularkunveno la 3-an de majo 1952-a en Basel, konsiderante la neceson plivigligi, por utili al pli bone interpopola interkono, la interŝanĝon de junuloj el diversaj landoj, pere de la Internacia Lingvo, interkonsentis pri fondo de „Internacia Centro Esperantista por Personaj Interŝanĝoj“ (ICEPI) kaj klopodos ĉi-maniere kunhelpi al la efektivigo de ĝia celo. La Centro havos kiel provizoran sidejon tiun de la Germana Esperanto-Junularo kaj estu pli poste transdonota al organizo, kapabla ĝin bone administri.“

La kunvenintoj parolis kaj diskutis ankaŭ pri la „Eŭropa Junularkampanjo“. Ili decidis atente observi ties agojn kaj, se necese kaj eble, atentigi tie pri Esperanto kaj kunhelpi.

En la ĉefa jarkunveno de SJS la estraro estis unuanime reelektita: Bruno Graf kiel prezidanto kaj Hans Hermann kiel vicprezidanto. Erwin Keller estas la peranto por T.J.O. en Svislando.

Sabatvespere okazis bonega „Amuza Vespere“, kiu fariĝis, per la lerta gvidado kaj partopreno kiel sorĉisto „HOHO“ de Hans Hermann, la kulmino de ĝojo dum tiu kunveno.

Plej impona kaj grava por la ekstera propagando estis la „publika mani-

festado", kiu okazis dimanĉmatene en hotelo Rialto. Krom la partoprenantoj de la kunveno ĉeestis reprezentantoj de la Svisa kulturdepartemento, reprezentantoj de tri bazelaj gazetoj, la prezidanto de Svisa Esperanto-Societo kaj la prezidanto de Germana Esperanto-Junularo.

Post salutparoladoj s-ro Lienhardt el Mulhouse, Francujo, faris brilegan paroladon pri „Valoro kaj signifo de Esperanto por la nuna mondo", kiu, laŭĉapitre tradukite de s-ano Graf, videble impresis ne nur la gesamideanojn, sed ankaŭ la gazetarajn kaj oficialajn reprezentantojn. Komuna oficiala tagmanĝo finis la kunvenon.

Okazis ankoraŭ boatekskurso al la bazela Rejnhaveno, kie alvenas pli ol triono de la tutsvisa varimporto. Ĉiuj klarigoj estis tradukitaj Esperantan, kio efikis ne nur bonan ĝuon de la viditaĵoj sed ankaŭ propagandon ĉe la aliaj gastoj kunveturantaj.

Ĉar la Esperanto-grupo Basel kaj ĝia prezidanto d-ro A. Bader bonvolis transpreni la ĉefajn kostojn de la tuta renkontiĝo, la partoprenantoj el Germanujo pagis preskaŭ nenion.

Trivorta impresio de sperta partopreninto: bonega-brilega-esperiga.

5-5-'52.

Michel Schmidt.

VIRINOJ EN MILITA SERVADO.

Unu-du, unu-du, dekstrrrén!

Akra voĉo krias la ordonojn trans la placon.

Rektegaj, alten svingante la manojn, rigardante rekte antaŭ si, pasas kolono de la virina helpa armeo.

Homoj haltas kaj kelkaj eĉ fiere rigardas la netan grupon, kiun ili nomas „la floro de nia soldataro".

Mi bedaŭras, sed tian fieron mi ne povas senti.

Rigardante ĉi tiujn dresitajn junajn virinojn mi eksentas timon kaj maltrankvilon kaj mi demandas min, ĉu ĉi ĉio estas preparado por nova milito.

Ankoraŭ ni vidas la soldatojn reveni. Dum jaroj ili forestis. Kiel bestoj ili vivis kaj batalis en la tranĉeoj kaj sur la sangaj batakampoj. Ili malciviliziĝis, ne plu povas alkitimiĝi al la monotona irado de la ĉiutaga vivo. Ili ne plu rekonas la sanktecon de geedziĝo aŭ la belecon de la naturo. Ĉu mirinde?

Kaj tamen — ni konstruas armeon pli fortan kaj perfektan ol iam ajn. Kaj ni por tia perfektigo tiras eĉ la virinojn en la militismon.

Virino kaj militismo. Ĉu ekzistas pli granda kontrasto?

Ĉe la vorto „virino" mi ne pensas pri uniformita estaĵo, kiu laŭordone marŝas, haltas, sin turnas, lernas pafi, partoprenas en la senhonoriga ago: milito.

Ĉe la vorto „virino" mi vidas la etan knabinon, kiu ludas kun siaj pupoj, plenaĝiĝas, fianĉiniĝas, edziniĝas kaj kune kun la edzo laboras por feliĉa estonteco en paca mondo. Mi pensas ankaŭ pri la patrino, kiu pene kaj zorge edukas siajn infanojn, por ke ili poste estu bonaj civitanoj.

Kompreneble ne ĉiuj virinoj edziniĝas. Multaj restas solaj. Sed ankaŭ ili havas sian taskon en la socio. Kaj ĉiu laboro estas pli utila ol la militista.

Certe la militista laboro estas alloga por junaj knabinoj: ili ne havas zorgojn, ricevas ĉion ĝustatempe. Ili portas „bravan” uniformon. Oni faras por ili ĉion, kelkfoje oni eĉ pensas por ili

Tamen mi opinias, ke ni urĝe bezonas tiujn knabinojn en aliaj lokoj.

Malsanulejoj kaj sanatorioj bezonegas flegistinojn. Ĉu tie ne estas interesa laboro?

Ĉu ne estas bela tasko en la lernejoj pretigi la etulojn por la granda vivotasko?

Ne ĉiuj knabinoj taŭgas por tia laboro. Ja estas la ŝanĝiĝemaj kaj aventuramaj tipoj. Nu, ankaŭ por ili estas eblaĵoj: ĵurnalistinoj, servistinoj sur ŝipoj aŭ en aeroplanoj, oficistinoj en fabrikoj kaj oficejoj ja faras utilan, interesan kaj enspezigan laboron. Ĉio estas pli utila ol milita servado.

Ĉar virinoj kaj militservado estas du kontraŭaj konceptoj.

Adapte laŭ ekzamena verkaĵo de Dick Bommel, lernanto en mezgrada nederlanda lernejo.

NIA OKA I.J.K. (Ry, Danujo, 10-17 aŭg.).

(*Adr. L.O.K.: Brønshøjvej 62, Kopenhago, Danujo*).

Provizora programo:

Dimanĉe (10/8): Alveno, akcepto, ordigo de kongreskotizoj, kongrespaperoj, indikado de dormejoj k.t.p. — Je la 18-a h.: manĝado; 20.30: **INTERKONA VESPERO**.

Lunde: Fotografado. Je la 10-a h.: **OFICIALA MALFERMO**. Posttagmeze: Banekskurso. Vespere: **Filmprezentado**.

Marde: **JARKUNVENO**. Libera vespero.

Merkrede: 8.30: Ekskurso al Himmelbjerget (manĝajpakajoj kunportataj). 20.00: Parolado kaj **PAROLAD-KONKURSO**.

Ĵaŭde: 8.30: Ekskurso al ÅRHUS. Reveno je noktomezo.

Vendrede: 8.30: Ŝipekskurso sur la lagoj al Silkeborg (manĝajpakajoj kunportataj). 20.00: **KABAREDO**. 21.00: **INTERNACIA BALO**.

Sabate: 8.30: Ekskurso al GL. RY kaj ØM KLOSTER (manĝajpakajoj kunportataj). Festvespero.

Dimanĉe Evt. DISERVO. Oficiala **FERMO**.

Jen do la alloga programo de nia OKA! Kiu ĝis nun hezitis anonci sin, nun certe tuj plenigos sian aliĝilon! Ĉu vi ankaŭ jam avertis viajn gekorespondantojn pri RY? Instigu ilin, atentigi aliajn pri nia I.J.K. Tiel multaj gekorespondantoj povus aranĝi rendevuojn en RY. Bona propagando! Sed rapide, ĉar la tempo rapidegas!

Dua listo de partoprenontoj. El Germanujo: 50. S. Steppes, Bad Kohlgrub; 51. J. Schubert, Schwenningen; 52. H. Köhler, Berlin/Neukölln; 53. H. Krüger, Berlin SW; 54. U. Sandkühler, Berlin/Neukölln; 55. Lili v. Waldowski, Berlin; 56. K. Meyer, Bremen; 57. M. Schmidt, Konstanz; 58. A. Hopfenmüller, Aschaffenburg; 59. R. Brune, Dortmund; 60. Ruth Bohl, Bremen.

MARŝKANTO DE LA JUNULAR'.

(Melodio: „Het lied der Vlaamsche Wandelknepen”, K. Candael).

(En la antaŭa I.J.K. montriĝis, ke la plej multaj partoprenantoj tute ne konas la oficialan T.J.O.-kanton. Tial ni ankoraŭfoje enpresigas la vortojn, kiujn ĉiu ano nepre lernu parkere. Pro teknikaj kaŭzoj ne eblas aldoni la muzikon, sed la melodion oni facile lernas dum I.J.K.!)

1.

Juneco estas nia flag',
Espero nia fort';
Fratega estas nia ag',
Amika nia vort';
Pacama nia gvidmotiv'
Por tuta nia far'.

Rekantajo:

Ni man' en man' en kolektiv'
Kantante iras al la viv',
Ni, junular',
Tra kampo kaj arbar',
Ni, junular',
Tra kampo kaj arbar'.

2.

Ridantaj lipoj: beltrezor'
De vivoĝoj' sen lim';
En sana korpo gaja kor'
Kaj suno en l' anim';
Dum en libera dancmotiv'
Flirtadas la harar'.

(Rekantajo.)

3.

La ĝojo de ĉi nova tag',
La belo de l' natur'
Alvokas nin al la imag'
De l' granda aventur',
Al la brilega perspektiv'
De ni, la junular'.

(Rekantajo.)

ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekretariino Helmi Veldhuysen, Hof v. Delflaan 79, Delft, Nederlando).

Dum la jarkunveno de la nederlanda Esp.-Unuiĝo LEEN, kiu okazis dum Pentekosto en Rotterdam, oni akceptis jenan rekomendon de la ĉefestraro de LEEN: La sekciaj estraroj permesu al geanoj de TJO malpli ol 25-j. ĉeesti senpage ĉe la ordinara sekciaj kunvenoj. Reciproke TJO petos siajn grupojn rajtigi LEEN-geanojn malpli ol 25-jarajn al senpaga ĉeesto de la grupkunvenoj de TJO. Nederlandaj TJO-anoj, kiuj deziras profiti ĉi tiun belegan okazon por viziti Esp.-societon, bonvolu turni sin al nia sekretariejo, sciigante sian aĝon kaj kiun LEEN-sekcion ili deziras viziti. Ili ricevos membrokarton, per kiu ili estos akceptataj ĉe LEEN. — Ankaŭ ĉi-loke ni sincere dankas al „La Estonto Estas Nia” pro la proponita helpo.

Post iom da tempo aperos la nova regulara skizo. Ĝi estos sendata al ĉiuj aktivaj anoj. Tiuj, kiuj ne partoprenos la I.J.K.'n, bonvolu ĝustatempe (do antaŭ Ry) sendi sian opinion al la sekretariejo. Sendu ankaŭ proponojn por la jarkunveno. — Krom la balotado k.t.p. restos sufiĉa okazo por diskuti pri Milittrifuzado, Neŭtraleco (kaj artikoloj), Mondfestivalo, k.t.p. — Se estas gravaj proponoj pri iaj aranĝoj, diskutoj, ktp., oni skribu tion kiom eble plej baldaŭ al Kaj Pedersen. Ankaŭ Propagando nepre estas diskutenda!

Ĉesparantoj! Por ke la kasisto povu pretigi sian jarraporton, vi bonvolu sendi al li viajn financaj raportojn antaŭ la 7-a de julio. Nepre plenumu ĉi tiun peton!

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

(Ĉio estas mendebla ĉe la T.J.O.-Libro-Servo, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.).

Niko kaj Nina, postkurso (ilustrita) legolibreto originala, de Joseph F. Berger, eld. de Esperanto-fako de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo; 70-p. broŝ. libreto; prezo 2 guld.

Simpla legolibreto, fakte romano en nuksoŝelo, kiu en 17 ĉapitroj rakontas pri la knabo Niko kaj la knabino Nina, de la infanaj jaroj ĝis ilia feliĉa geedziĝo. Kvankam ni opinias la enhavon iom dolĉa kaj dezirus la lingvon (kiu, cetere, estas tre bona) por komencantoj ankoraŭ pli simpla, ni tamen povas varme rekomendi la verketon.

Kiel aŭtodidakto al pedagogia scienco, de Klemenž Wiczorek, eld. de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo; 40-p. broŝurita libreto; prezo 1,50 guld.

La aŭtoro de la verketo mortis en 1947-a kaj parenco lia nun eldonis ĝin. Eble oni pro respekto al la mortinto ne volis fari ŝanĝojn en la manuskripto rilate al enhavo kaj lingvo, kiuj tamen estus plibonigintaj ĝin. Ĉar ni devas konfesi, ke la enhavo (kaj celo) de la libreto al ni ne estas tute klara. La unuaj paĝoj fakte estas filozofiado de la verkinto. Sekvas ĉapitroj pri ideoj de konataj edukistoj el la antikva kaj novaj tempoj. (I.a. la ideoj de Comenius, la ĉeĥa pioniro por la kreo de universala lingvo certe interesos esperantistojn). Plue la verketo enhavas diversajn personajn konkludojn pri edukado, el kiuj kelkaj tre bonaj, kvankam ne novaj. Sed ĉio estas iom obtuza.

Kalendaro 1952 (26 × 38½ cm); kolora reprodukto de oleopentraĵo pri parolado de Maŭ en Partia Lernejo de Jen-an en 1942-a. Eld. „El Popola Ĉinio”, 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinujo.

Oomoto, n-ro 1-2, 1952-a, 32-p. jubilea n-ro, okaze de la 60-j. ekzistado de la Oomoto-movado. La abonprezo de Oomoto estas 1,20 dol.; Adr.: Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Die Ungarische Provinz, riĉe ilustrita, germanlingva broŝuro, 26-p.; eld. Ungarisches Nationalkomitee für Fremdesverkehr, Budapest VII, Dobutca-75-81.

Kanteto Belsona, muziko kaj teksto de S. S. de Jong, Tjerkwerd Fr., Nederlando. Originala, simpla kanto, kies melodion (en cifernotoj) oni facile lernas. Prezo po 5 c.

Ilustrita propagandkarto kun nederlandlingva propaganda teksto. Eld. H. Perry, Notgerusweg 25, Maastricht, Ned.; prezo ĉe almenaŭ 20 ekz. po 5 c.; 100 ekz. po 4 c.

Infanoj de la Atombombo. Krioj de geknaboj en Hiroŝima; originale kompilis Prof. Osada Arata; mallongige tradukis kaj eldonis Esp. grupo en Kioto, Japanujo; 25-p. kajero, multobligita; prezo 1 resp. kup.

En simplaj verkaĵoj, ofte tre kortuŝaj, infanoj el Hiroŝima rakontas pri siaj teruraj spertoj je la 6-a de aŭg. 1945-a, kiam eksplodis atombombo super ilia regiono. — Bedaŭrinde estas, ke la literoj de la kajero ofte estas tre malklaraj kaj ke la lingvo ne estas pli bone kontrolita. La enhavo certe meritas pli bonan eldonon.

ĜENERALAJ SCIIGOJ.

Internaciaj Feriaj Esperanto-kursoj, kiuj okazos 3-periode inter la 15-a de julio kaj la 31a de aŭg. '52-a (vidu LJVN aprilo-majo) estos antaŭitaj de **Turisma Internacia Renkonto** (1-14 julio). Informojn de f-ino J. Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse, Francujo.

Internacia Junular-tendaro estos organizata de la junulara sekcio de Germana Esperanto-Asocio (Freiburg/Br., Andreas-Hoferstr. 8) kune kun la SAT-junulfako en la rejnlanda urbo Solingen apud Düsseldorf de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1952-a. — Interesaj programoj kaj ekskursoj. Aĝolimo 30 jaroj. Partoprenkostoj (inkl. restad- kaj manĝokostoj) nur 30 DM. Petu informojn de: GEJ, Freiburg/Br., Andreas Hoferstr. 8, Germanujo.

Internacia Studenta konferenco en Schlugsee (Nigra Arbaro, Suda Germanujo), 17-24 aŭg. '52-a por la unua fojo uzos Esperanton. Partoprenkostoj 60 DM. (Eblos akiri redukton). Informojn donas IKESA, Laksegade 35, Kopenhago K., Danujo.

Internacia Arkeologia Tendaro kaj Studrestado en Danlando de la 5-a ĝis la 26-a de julio. Aĝolimo 35 jaroj. Kostoj 110 D.Kr Informojn donas Dana Internacia Studentkomitato, la universitato, Sct. Pederstraede 19, Kopenhago K.

Esperantista Fremdultrafika Servo (Okcident-Eŭropa) ĉiel pretas helpi turistojn. Direkcio R. Loeckx, Konijnenperken 109, Bruseio-Bosvoorde, Belgujo. (1 Rpk. por korespondajo)

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Aŭstrujo: Kiu povas havigi al mi bonan laboron? Ne gravas kie en la mondo ĝi estas, aŭ kia. Ĝi estu nur interesea kaj bone pagita. Mi estas 18-j. Božić Johann, Gablern 18, Post Eberndorf, Kärnten.

Bulgarujo: Jančo Kostadinov, str. Drin-24, Burgas, 17-j. studento, dez. kor. i. a. pri sporto, interŝ. bildkartojn, fotojn, sportgazetojn.

Nia grupo da komencantoj (17-40-j.) dez. kor. k. l. t. m. kaj interŝ. poŝtm. Skribu al Marin W. Koev, str. Ĉumerna 6, Kazanlik. Resp. certa.

W. Hytilof, Republikanska 84, Burgas, dez. kor. k. interŝ. poŝtm.

Danujo: Por prui en geknaba filatelista rondo la taŭgecon de Esp. mi petas vin sendi multajn ne-danajn pm. Ili ne bezonas esti diversaj aŭ multvaloraj. Mi volonte sendos al vi danajn pm. Bedaŭrinde mi ne povas kor. Viggo Sylvest, Hedehusene, Danujo.

Francujo: Jean Angot, instruisto, Retaud (Charente M.me) dez. interŝanĝi poŝtkartojn kaj leterojn kun nederlanda instruisto.

Hispanujo: M. Pérez Belancke, studento, Alcober 7-3', Zaragoza, dez. kor. kun nederlanda fraŭlino.

Japanujo: Juniĉi Ŝindo, 1-17 Kaminarimon, Asakusa Taito-Ku, Tokio, 16-j. lernanto, dez. kor. k. l. t. m. pri lernejoj kaj poŝtmarkoj.

18-jaraj esperantistoj de la Hukuoka Centra Supera Duagrada Lernejo dez. kor. kun eksterl. geamikoj. Toyoko Tsutsumi, 1-53 Sansōdōri, Hukuoka.